

O sator rerum

Brevier-Himno

Ordinara tempo > 2-a kaj 4-a semajno > merkredo > horo de la legaĵoj > nokte

*O sator rerum, reparator ævi,
Christe, rex regum, metuende censor,
tu preces nostras pariterque laudes
suscipe clemens.*

*Noctis en cursu tibi vota laudum
pangimus; præsta tibi sint ut apta,
nosque concentu refove perenni,
luminis auctor.*

*Da dies nobis probitate faustos
mortis ignaram tribuendo vitam,
semper ut nostros tua sit per actus
gloria perpes.*

*Ure cor nostrum, pius ure lumbos
igne divino vigilesque nos fac,
semper ardentes manibus lucernas
ut teneamus.*

*Æqua laus summum celebret Parentem
teque, Salvator, pie rex, per ævum;
Spiritus Sancti resonet per omnem
gloria mundum.*

Amen.

latina T: eble 9-a jarcento

Vi ĉion semas, la eonojn tenas,
juĝas potence, Kristo, Reĝ' de l' reĝoj!
Ho, niajn preĝojn, same niajn laŭdojn,
milde akceptu.

Ĉi tiujn laŭdojn, kiujn ni promesis,
ni en la kur' de l' nokto plaĉe kantu,
ke ni per Vi en harmoni' bonfartu,
Lumo-aŭtoro.

Vi nin pravigu, por ke en feliĉo
daŭre ni vivu sen la spert' de l' morto.
Estu al Vi per ĉiuj niaj agoj
gloro eterna.

Per Dia fajro ardu nia koro,
ardu la lumboj, viglu nia menso,
estu brulantaj ĉiam niaj lampoj
en niaj manoj.

Laŭd' sam-valora gloru Vin, ho Patro,
Vin, ho Savanto, pia Reĝ', eterne,
sama ador' al Vi, Spirito Sankta,
sonu tra l' mondo.

Amen.

E: Peter Langenecker kaj Albrecht Kronenberger 2005